

Opava, la 1-an de junio 1955

MALFERMITA LETERO

por ĉiuj funkciuloj en la Esp. Junulara movado en ĈSR (Centrejo, RD. LD) kaj por ĉiuj anoj de la junularaj grupoj

Proksimiĝas nia tutŝtata kunveno de Junularo en Gottwaldov-Otrokovice la 9-an de julio kaj tial estas necese **bone kaj serioze** pridiskuti ankoraŭ antaŭ tiu kunveno nian pluan sukcesan agadon.

Mi kiel estanta ĉefdelegito de Junularo post bona pristudo kaj pripenso de mia propra situacio devas demisii el mia ĝisnuna funkcio, sed ĉar mi ne dezirus, ke nia junulara movado eniru iun gravan krizon, mi alvokas ĉiujn grupojn jam nun pripensi kaj sendi proponojn, kiel aranĝi nian pluan (Junularan) ekzistadon, kiel direktigi nian agadon, kaj kiun komisii per la plua gvidado de Junularo en ĈSR.

Ne eblas tiun aferon solvi nur dum nia kunveno en Otrokovice, ĉar estos necese ĉion tre bone pripensi kaj dum la konferenco nur aprobi la preparitan.

Tial mi turnas min al ĉiuj lokaj grupoj, ke estu dum lokaj kunvenoj tiu ĉi afero bone pritraktita, kaj ĉiuj proponoj al la plua ekzisto de Junularo, al la elekto de novaj funkciuloj, al la direkto de nia plua laboro, ĉiuj sugestoj senditaj al viaj regionaj perantoj.

De la regionaj perantoj mi postulas la ĝisfundan raporton, kiel ili imagas nian pluan laboron, kaj konkretajn proponojn por la reorganizo de nia junulara movado. Proponu viglajn samideanojn, kiuj kapablus preni la funkcion de ĉefdelegito de nia Junularo.

Ĉar tempo urĝas kaj restas antaŭ la konferenco nur unu monato, estas necese agi tuj!

Mi estas kompleza la konferencon gvidi kaj havi referaton pri nia laboro dum la pasinta tempo, pritaksi la laboron de unuopaj delegitoj kaj poste transdoni la pluan gvidon de la kunveno al la preparkomitato, kiu devas elekti novan estraron.

Mi ne volas per tiuj ĉi vortoj diri, ke mi forlasas la Esperanto-movdon, tamen pro ŝanĝo de mia okupo mi ne povus bone zorgi pri la plua bona laboro de niaj grupoj, ĉar mi nun ne estas reganto de mia tempo; tial multaj aliaj zorgoj pelas min iom forlasi la organizan flankon en la tutŝtata nivelo, plue mi deziras zorgi pri nia loka grupo por plifirmigi ĝian staton.

Ankaŭ necesas pripensi, ĉu de la nova jaro ni eldonadu nian centran junularan cirkuleron *Togiĝo* (aŭ kian ajn nomon ĝi havu) aŭ peti iun gravan tutŝtatan cirkuleron (aŭ Spegulon, aŭ Bultenon el Praha) por tie havi 2-3 paĝan junularan aldonon. Kun bedaŭro mi devas konstati, ke nun post kvinjara senpaŭza periodo, kiam en Opava estis eldonitaj diversaj cirkuleroj sub diversaj nomoj, mi devas eldonadi nian *Togiĝon* pro teknikaj kaj temporabaj kaŭzoj. Tiun ĉi demandon ni povos solvi dum la konferenco en Otrokovice. Ĝis fino de la jaro mi ankoraŭ redaktos kaj eldonados *Tagiĝon*.

Ĉar tiu ĉi malfermita letero estas sufiĉe decida momento en nia plua agado, mi ne povas alie ol jam nun danki al ĉiuj, kiuj konfidis kaj komisiis min per la funkcio de ĉefdelegito de Esperanto-Junularo en ĈSR, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj helpis al la aktiva laboro de Esperanto-Junularo, kiu en la tempo de certa stagno de la tutŝtata Esperanto-movado kapablis vivteni kaj krom tio doni ofte eĉ kuraĝon al la Esperanto-klubo en multaj lokoj por vigla kaj sentima poresperanta laboro. Mi pensas, ke nia agado ne estis vana.

Ni esperu, ke komenciĝos ankoraŭ pli bona periodo de la Esperanto-movado en ĈSR kaj eĉ en la aliaj popoldemokratiaj landoj, kiam ni povos sufiĉe firme apogi nin je iu kreota tutŝtata Asocio de Esperantistoj, kie ni povus kiel unueca tuto labori por unu difinita celo, per unu koncepto sen diversaj malsamspecaj opinioj pri nia komuna klopodo.

Tamen mi dezirus, ke nia junulara sekcio plu ekzistu, plu batalu per siaj propraj armiloj de juneco kaj energio. Sed por tio estas necese elekti la fervoran gvidadon - fervoran laŭ nia nuna

terminaro - ian Centrejon, kiu kapablas doni al nia junulara movado pli da juna energio, pli da entuziasmo, kaj kiu poste povus rikolti pli da dolĉaj fruktoj de nia agado.

Mi devas konfesi, ke mi kaj nia tuta Centrejo kaj la regionaj delegitoj, krom kelkaj esceptoj, ne plenumas tion, kion ni por pliaktiviĝo de Junularo en lasta tempo atendis. Laŭ mia opinio ni post kelkaj niaj ekbriloj en pasinteco iom stagnas kaj bezonas novan entuziasman junan sangon. Ni kredu, ke tiu ĉi sango ĝustatempe venos. Mi ne timas ian krizon de nia junulara movado, ĉar mi kredas en junajn homojn, kiuj kreskas en niaj grupoj.

Fine de mia letero mi ankoraŭfoje petas ĉiujn grupojn bone pridiskuti tiun ĉi temon dum siaj kunvenoj kaj amase skribi siajn opiniojn pri tuta afero al siaj regionaj perantoj aŭ al Jaroslav Kuzník, Roosewelta 17, Opava.

Mi salutas vin ĉiujn, por nia nova laboro mi deziras al ni brilajn sukcesojn, kaj kun danko al ĉiuj mi restas

samideane via

Kuzník Jaroslav p.m.

Podle originálu, v roce 1955 vytištěného nekvalitní technologií „ormig“, dne 9.10.2014 přepsal Jan Werner.